

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
115
vintro 2018/2019



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

31-a de marto 2019

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

Al ĉiuj membroj de nia federacio, mi deziras feliĉon kaj sukcesojn en viaj agadoj por via loka Esperanto-asocio.

Ĉijare malaltiĝis iomete la nombro de federaciaj anoj.

Dum nia marta ĝenerala kunveno, ni pritraktu ĉi tiun temon, por trovi solvon kaj antaŭeniri laŭ bona vojo. Tion ni sukcesos fari... tio estu unu el niaj federaciaj deziroj kaj defioj por la nova jaro !

Denove, bonan jaron al ĉiuj !



**Feliĉan Novan Jaron
al la membroj kaj apogantoj de nia federacio**

enhavo

2	jarraportoj 2018	7	UNESKO Conférence internationale des ONG
5	Kultura Semajnfino en Le Beausset	8	mesaĝkesto agendo
6	Zamenhof-festo en Saint-Raphaël	+	aliĝilo 2019 kunvokilo por la membro-kunveno

Ne forgesu pagi la aliĝkoton por la jaro 2019 - 6 € - al **Espéranto-Provence**

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte
(aliĝilo aldonita al tiu ĉi gazeto)

Dankon!

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2019 - 6 € - à **Espéranto-Provence**

soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte.
(bulletin d'adhésion joint à ce journal)

Merci !

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / *Assemblée générale de la fédération*

dimanĉon la 3-an de marto - je la 14-a 30

Les Issambres (Var) - Résidence Vacanciel du Val d'Esquière

kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

Bonvolu legi la sekvajn moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2018.
Estas aldonitaj sur apartaj paĝoj la kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo (en okazo de via neĉeesto).

1 - Morala raporto

Pierre Oliva

Ĉijare, multaj el ni partoprenis en la Universala kongreso en Lisbono ; mi ilin gratulas.

Pri nia federacio, mi konstatis, ke malaltiĝis la nombro de membroj kaj ankaŭ tiu de la partoprenintoj en niaj diversaj klubaj kursoj. Bedaŭrinde !

Mi nature estas ĉiam optimista kaj mi certas, ke dum nia Ĝenerala Kunveno en les Issambres, ni kapablos serioze labori pri tiu temo por inversigi tiun situacion.

Post donaco de la lernolibroj «Méthode 11» kaj «Espéranto-Express» en la biblioteko Méjannes en Aix-en-Provence, mi povis konstati, ke la libroj estas tre ofte prunteprenitaj. Plie, danke al Amikumu, multe da personoj en la proksimeco de niaj Esperanto-asocioj uzas nian ligvon.

Mi supozas, ke ili lernas la bazojn per la reto.

Bedaŭrinde, ĝis nun, mi ne scias kiel allogi al niaj kluboj ĉi tiujn novajn esperantistojn. Ĉu per la reto, per telefonalkvoko, per invito al kunveno ktp... Kion fari, diri, proponi ?

Do, ĝis nia Ĝenerala kunveno, ni pripensu por kune trovi efikan kaj simplan solvon al tiu problemo, ĉar mi opinias, ke ĉi tiu punkto estas tre grava por nia movado.

Por fini per agrabla sciigo pri 2018, la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres kaj la Kultura Semajnfino en Le Beausset estis tre belaj sukcesoj, ni ja kunigis por ambaŭ staĝoj maksimumon da partoprenantoj.

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Espéranto-Provence havis 86 membrojn je la 31a de decembro 2018.

40 pagis al UFE

el ili : 10 pagis nur al UFE

13 pagis la grupan kotizon (Marseille kaj Gap)

6 pagis al UFE kaj la Federacio

11 pagis al UFE kaj sia klubo

21 pagis nur al la Federacio

25 pagis nur al sia klubo

2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklaritaj asocioj

04 - Manosque: E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque) - 8 federaciaj membroj

05 - Gap: Espéranto-Gap - 6 federaciaj membroj
13 - La Roque-d'Anthéron: Espéranto-La Roque
13 - Marseille: Espéranto-Marseille -
7 federaciaj membroj
ttt-ejo: <http://esperanto.marseille.over-blog.com>
13 - Miramas: G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)
83 - Saint-Raphaël: Espéranto-Club Saint-Raphaël -
18 federaciaj membroj
83 - Le Beausset: Espéranto – Le Beausset -
10 federaciaj membroj
84 - Avignon: K.E.C.A.
(Kultura Esperanto-Centro de Avinjono)

2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 - La Ciotat ; 84 - Carpentras ; 84 - Orange

3 – Administro

estraranoj (3):

prezidanto: Pierre Oliva

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte

aliaj komitatanoj (6):

Monique Arnaud, Marc Gallardo, Franz Mimmersheim (eksigita la 2an de decembro), Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo: Pascal Vilain

retejrespondeculo: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France:
Pascal Vilain (anstataŭanto: Renée Triolle)

membrokunveno:

Ĝi okazis en Les Issambres (83) la 25an de februaro, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

18 partoprenintoj + 21 senditaj rajtigiloj

komitatkunsidoj:

> januaro 28: Marseille (ĉe Thierry Spanjaard)

> februaro 25: Les Issambres

(post la membrokunveno)

> junio 3: La Ciotat (ĉe Renée Triolle)

> decembro 2: Le Beausset

(post la Kultura Semajnfino)

4 – Instruado

- kursoj

> en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon, Manosque

> en «Lycée de la Méditerranée» en la Ciotat: 12 lernantoj – instruas Renée Triolle

> en «Collège Le Petit Prince» en Gignac-la-Nerthe (13) – 20/25 lernantoj – instruas Eric Streichemberger

- staĝoj

> februaro 25 / marto 3 - Les Issambres (83):

Mediteranea Esperanto-Semajno

> decembro 1/2 - Le Beausset (83): Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de Mari-Roza Vilain, Renée Triolle, Pascal Vilain)

- ekzamenoj:

> junio 16 – Le Beausset: FEI-ekzamenoj;

tri kandidatoj, ĉiuj sukcesis



5 – Informado – komunikado

> dum la tuta jaro, disdonado de Le Monde de l'espéranto (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Dracénie)

> dum la tuta jaro, en Marseille (Equitable Café), la 1an jaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo

> februaro 21 – Gap – Supera hotellernejo: Monique Arnaud prezentis nian lingvon al 30 lernantoj

> februaro 22/23 - Saint-Bonnet en Champsaur – Collège de Saint Bonnet : Monique Arnaud prezentis nian lingvon al du klasoj (6a kaj 5a)

> marto 13/16: sama laboro en la sama loko

> aprilo 12 - Gap - Supera hotellernejo: Monique Arnaud ree prezentis nian lingvon

> E.K.E.M. (Manosque): deĵorado en la Domo de la Asocioj la unuan kaj trian sabatojn, ĉiumonate dum la tuta tago ekde la 9a45.

> septembro 2 - Fréjus: «Forumo de la asocioj»

> septembro 8 – Manosque, La Ciotat, Le Beausset: «Forumo de la asocioj»

> septembro 9 – Marseille: «Vivacité» - Forumo de la asocioj


6 - klubaj eventoj

> januaro 17 - La Ciotat: membro-kunveno + reĝkuka festeto

> januaro – Manosque: ĝenerala kunsido

> februaro 4 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno

- > junio - Avignon: kultura tago kaj pikniko
- > junio 5 (Marseille) kaj 6 (La Ciotat): prelegturneo de Julian Modest (Georgi Mihalkov) el Bulgario
- > junio 24 - Saint-Raphaël: komuna manĝado kaj distra posttagmezo en Les Issambres
- > septembro 2 - Fréjus (Base Nature): pikniko de la klubo de Saint-Raphaël
- > decembro 15 - Saint-Raphaël: Zamenhof-tago
- > decembro 16 - Avignon: 40-a Zamenhof-tago kun prelego de Thierry Spanjaard pri la temo: «Metromapoj, esplora universo», sekvita de distra programo.



Thierry jam prelegis pri metromapoj okaze de la Kongreso 2016 de Espéranto-France en Marsejlo

7 – movadaj eventoj

- > februaro 24 / mars 3 - La Bastide-sur-l’Hers (09): staĝo pri ĥora kantado – partoprenis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva
- > aprilo 12-13 - Tehrano (Irano): 5a Irana Esperanto-Kongreso - partoprenis Thierry Spanjaard
- > aprilo 20-28 - Greziljono (Baugé): staĝo «PRINTEMPaS» - partoprenis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva
- > majo 18-21 - Zweibrücken (G): Franca-Germana Kongreso - partoprenis Renée Triolle
- > julio 28 - aŭgusto 4: «103-a Universala Kongreso de UEA» en Lisbono (Portugalia) - partoprenis dudeko da Provencanoj.

8 – kulturaj eventoj

- > februaro 21 - La Ciotat: Internacia Tago de la Gepatra Lingvo – budo de Espéranto-La Ciotat
- > marto 9-11 - Saint-Etienne: Festivalo «Curieux Voyageurs» - Alain Rémy prezentis sian biciklan vojaĝon «Ukrainio-Rusio»
- > majo 5 - La Ciotat: «Eŭropa Festo»; budo de Espéranto-La Ciotat

- > majo 19 - Marseille: Forumo de Lingvoj; budo de Espéranto-Marseille; prelegeto de Chantal Beaumont kaj Victor Grousset.
- > majo 26 - Embrun: «Eŭropa Festo»; budo de Espéranto-Gap
- > decembro 17-19 - Parizo: Internacia NRO-Konferenco 2018 ĉe Unesco «Valoriser l’engagement et la contribution des ONG partenaires de l’Unesco»; partoprenis Renée Triolle por UEA kaj Monique Arnaud por ILEI.

9 – diversajoj

- > forpasis Christiane Puydebois (klubo Saint-Raphaël) kaj Francis Briulle (klubo Avignon)
- > Thierry Spanjaard zorgis pri nova retejo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)
- > aperis en Eo-revuoj artikoloj de federacioj: en Monato (Marc Gallardo), en Literatura Foiro (Renée Triolle)...
- > julio: du ĉininoj gastis ĉe Thierry Spanjaard
- > aŭguste: Brazila paro gastis ĉe Renée Triolle ; ili estis akceptitaj ĉe la turismoficejo en Le Beausset, kaj vizitis La Cadière d’Azur sub ĉiceronado de loka komencantino.
- > aŭguste: Mari-Roza kaj Pascal Vilain renkontiĝis kun Lu Wunsch-Rolshoven, prezidanto de EsperantoLand, en La Croix-Valmer
- > oktobro 2: vizito de du rusoj el Jekaterinburgo, kiuj partoprenis en la kurso de la loka klubo
- > oktobre: britino estis akceptita en Nico de Nicole kaj Gilles Wallez
- > Alain Rémy biciklis dum la printempo kaj somero tra Eŭropaj landoj kaj iris bicikle al la Lisbona UK.

10 – venontaj okazaĵoj

- > marto 2-9 – Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno
- > novembro aŭ decembro 2019 - Le Beausset: Kultura Semajnfino (se plu eblos) - datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj



3 - Financa raporto

Nicole Lafitte

bilan financier année 2018

recettes		dépenses	
cotisations	432,00	édition et envoi gazette	371,00
dons espérantistes	1116,00	dépl. Paris pour Eo-France	126,00
vente de livres lors du stage	25,00	dépl. comités directeurs de la fédération	60,00
vente Méthode 11	10,00	déplacement espérantiste étranger	65,00
		achat de 10 exemplaires « Méthode 11 »	71,00
		site Espéranto-Provence	212,00
		abonnement à Unesco-Kuriero	50,00
		examens FEI	160,00
stage Le Beausset	1704,00	stage Le Beausset	1490,00
(bilan stage : bénéfice : 214,00)			
		excédent au 31/12/2018	682,00
total	3287,00	total	3287,00

1a kaj 2a de decembro: Kultura Semajnfino en Le Beausset



bonega organizado
kontentiga nombro de partoprenantoj
trinivelaj kursoj
bongustaj manĝaĵoj
instrua sabatvespera programo
jen ingrediencoj de sukcesa staĝo!

raporto pri la 1a kurso

Marc Chaminade, lernanto pere de Metodo 11

Delphine, vera komencanto, Nicole kaj Cathy, lernantinoj, kiuj deziris relerni la bazojn, Monique, kompetenta esperantistino kaj du "dekunujaj"* geesperantistoj, Florence kaj Marc, sen forgesi Mari-Rozan, nian instruanton simpatian kaj pasian: jen la homoj, kiuj estis en la unua grupo.

Ni multe parolis pri bildoj kaj ni faris ludojn. Ni ridis kaj laboris en bona etoso dum la tuta staĝo. Tiel, neatente, ni lernis rapide kaj facile.

Kaj se ofte niaj kapoj «fumis», ni multe ŝatis tiujn momentojn.

* "dekunua lernanto" = iu, kiu uzas la Metodon 11



raporto pri la 2a kurso: Kiel abellaboristinoj

Maggy Combot

Je la unua kaj dua de decembro 2018 okazis la kutima Esperanto-staĝo en Le Beausset. La partoprenantoj gastis en «La maison des frères» kun ĉiam sata ventro, dank' al Pierre, la kuiristo.

Tri kursgvidantoj, Mari-Roza Vilain, Renée Triolle kaj Pascal Vilain, paroligis nin en Esperanto. Mi elektis la duan nivelon kun sinjorino Triolle, kies kurso temis pri aktualaĵoj. En agrabla etoso, nia grupo laboris kiel abellaboristinoj. Ni diskutis ekologion, migradon, edukadon, geedziĝon kaj amikecon tra la tuta mondo. Dum la kultura vespero, Thierry Spanjaard preparis nin al la venonta Eŭropa balotado. Ankoraŭ pli riĉaj Esperante kaj amike ni ĉiuj hejmeniris. Kiam estos la venonta staĝo?



raporto pri la 3a kurso: ho ve, nenio ricevita !



Evidente, estis iel utopie esperi ricevi raporton, sen peti tion de iu.
Konklude : inta utopio ne ĉiam iĝas anta realaĵo ! (Pascal V.)



83 - Esperanto-Klubo Saint-Raphaël

Les Espérantistes fêtent les droits de l'homme

Il est de tradition, pour les locuteurs et sympathisants de l'Espéranto, de se réunir le 15 décembre, date anniversaire de la naissance de l'initiateur de la langue internationale. Une fois encore, ils étaient environ une vingtaine, samedi, sous la plaque qui porte le nom du Docteur Zamenhof à Saint-Raphaël.

Cet événement a coïncidé cette année avec la célébration du 70^e anniversaire de la Déclaration universelle des droits de l'homme, adoptée en 1948.

Il a donc été rappelé à tous que l'Universala Esperanto-Asocio (UEA), la principale association mondiale pour l'utilisation et le développement de la langue internationale espéranto, a inscrit dans ses statuts le respect des droits de l'homme comme condition essentielle pour son action, et qu'elle ne manque pas de souligner la concordance entre les efforts de Zamenhof, qui a consacré sa vie à la fraternité de l'humanité, et ceux des Nations Unies pour universaliser ces droits.



Les espérantistes ont célébré le 70^e anniversaire de la Déclaration universelle des droits de l'homme. (DR)

À l'issue de cette petite cérémonie, les personnes présentes ont été invitées à lire, en français et en espéranto, quelques articles de la Déclaration universelle de 1948.

Les projets pour l'an nouveau ne manquent pas : assemblée générale en début d'année, avec partage de la galette des rois, accueil d'un espérantiste

des États-Unis, stage international aux Issambres du 2 au 9 mars, et bien sûr les cours donnés chaque mercredi de 15 h à 17 h à la Maison des associations, rue de la Soleillette à Saint-Raphaël, sont au programme.

► Renseignements : 04.94.95.66.18 ou sur le site de la fédération espérantiste pour la région Paca : www.esperanto-provence.org

artikolo en Var-Matin london la 17an de decembro



« Valoriser l'engagement et la contribution des ONG
partenaires de l'UNESCO »
La Conférence internationale des ONG 2018
Paris - 17/19 - 12 - 2018

Monique Arnaud

Raporto por ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), NRO (Ne-registara organizaĵo) ĉe UNESKO.

Martine kaj Max Demouy malkovris la taskon reprezenti nian asocion, kaj tre lerte kaj efike reagis.

La salutmesaĝo de Audrey Azoulay, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, okaze de la UEA-Kongreso en Lisbono en 2018, multe rilatis al la graveco de instruado de Esperanto, do ni elektis kiel dokumenton kelkajn eltiraĵojn el ŝia mesaĝo.

Estis pli ol 100 NRO-oj reprezentitaj, la salono estis preskaŭ plenplena, tamen restis lokoj por observantoj kiel ni. S-ro Sene el Senegal, respondeculo pri la Federacio de sindikatoj de instruistoj, tiel interesiĝis pri Esperanto, ke li tuj sendis mesaĝon al Mirejo Grosjean kaj pretas helpi por organizi eventon en sia lando!

Marde posttagmeze, U.E.A. petis kaj ricevis budon bone lokitan, kaj bonŝance samtage okazis la Internacia Tago de la Araba Lingvo. Por la unua fojo preterpasis multaj junaj arabinoj; ili interesiĝis pri nia lingvo kaj ni povis enmanigi dokumentojn en la araba kaj diskuti ĉu angle ĉu france. Ĝojindas kontakti homojn ne facile atingeblajn ĝis nun.



de maldekstre dekstren:

Monique Arnaud, Max Demouy (ILEI)
Rakoën Maertens, Renée Triolle (UEA)
Patrick Gallaud (UNESKO)
François Lo Jacomo (UEA), Martine Demouy (ILEI)

Estas bone, ke du asocioj partoprenas; tiel homoj havas plian ŝancon paroli kun ni. Tio okazis por sinjorino Doina Spita, el Rumanio, rilate interkompreniĝon de lingvoj, kaj ni same povis kontakti sinjoron Diego, el "Tradicioj por Morgaŭ", kiu lanĉis: "2019, Internacia jaro por indiĝenaj popoloj".

**Extraits du Message de Audrey Azoulay, Directrice générale de l'UNESCO,
à l'occasion du Congrès mondial de l'association universelle d'Espéranto -Lisbonne, 29 juillet 2018**

Comme vous le savez, l'UNESCO soutient l'enseignement de l'espéranto depuis de nombreuses années. Notre Organisation partage en effet avec le mouvement espérantiste des valeurs communes : l'aspiration à construire un monde de paix, l'entente entre les peuples, le respect de la diversité culturelle, la solidarité par-delà les frontières. Le ciment de toutes ces valeurs, c'est la capacité au dialogue, à l'écoute, au partage. Les langues, qui sont le vecteur de ce dialogue, constituent donc, pour la mission que nous avons à accomplir, et pour la défense des valeurs qui sont les nôtres, un enjeu essentiel...

...Car l'espéranto ne cherche pas à gommer la multitude des langues parlées dans la monde ; il représente au contraire un moyen de communication respectueux de toutes les langues, majoritaires ou minoritaires, et établit une communauté de locuteurs

soustraite à toute hégémonie économique, politique ou culturelle.

Parler l'espéranto, c'est se hisser au niveau d'une conscience cosmopolitique, c'est être citoyen du monde – sans renoncer à ses attaches particulières.

Le thème retenu pour votre congrès cette année est : « Cultures, langues, mondialisation : où voulons-nous aller ? » La direction à prendre, c'est certainement celle que votre mouvement et notre Organisation indiquent depuis de nombreuses années : s'engager encore et toujours pour préserver et vitaliser cette composante essentielle du patrimoine immatériel de l'Humanité que sont les langues ; défendre la diversité linguistique et promouvoir l'éducation multilingue.

Ainsi pourrons-nous bâtir un monde plus ouvert, plus inclusif et pacifique.



El la mesaĝkesto de la legantaro

Venis mesaĝoj de federacianoj...

Thierry Spanjaard

Mi ĝojegis vidi, ke nia gazeto ne nur enhavas pli kaj pli da interesaj artikoloj, sed ankaŭ ke ĝi estas nun bazita sur nova, pli belaspekta, pli moderna, pli alloga enpaĝigo! Ĝi evidentigas la diversecon de aktivaĵoj en nia regiona federacio.

Maggy Combot

Mi ne ankoraŭ ĉion legis: iom post iom. Sed mi jam notis du nekonatajn vortojn. Certe sekvas aliaj, kiujn mi ne komprenos.

Vidu, mi ne nur legas sed ankaŭ studas la revuon!

Rose-Marie Quintin

Kiel kutime, la gazeto estas tre agrabla kaj interesa. Mi printas ĝin, por ke la klubanoj povu foliumi ĝin kaj scii, kio okazas en aliaj kluboj.

... kaj ankaŭ de samideanoj el aliaj regionoj...

Martine Demouy (Périgueux-24)

Dankon pro la informilo tre interesa!

Yves Nicolas (Caen-14)

Gratulon pro via belaspekta kaj interesa « Espéranto-Provence ».

Liba Gabalda (La Norville-91)

Ĉar oni neniam povas ĉeesti ĉiujn programerojn proponitajn en UK, estas profite legi alies raportojn kaj komentojn pri diversaj vidpunktoj kaj okazaĵoj dum la Kongreso.

Mi estas dankema legantino de via interesa gazeto

Gilbert Duval (Nantes-44)

J'ai beaucoup apprécié la nouvelle présentation du « bulteno ».

... eĉ de neesperantisto... : Hélène Maignan (archiviste de la ville – Mairie de Cavaillon)

Nous vous remercions pour ce numéro de votre revue

qui va compléter le dossier documentaire de notre bibliothèque concernant le « r Zamenhof ».

La Kultura Esperanto-Centro de Avinjono informis nin pri la forpaso de sia amiko kaj klubano **Francis Brieuille**, la 2an de novembro 2018. La membraro de Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn kaj la membrojn de la Avinjona klubo.



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

en Europe

janvier 7-12 - Le Beausset (83) : exposition de Christine Biancheri > "Sur le chemin de l'espéranto"
infos [sur notre site](#)

mars 2-9 - Les Issambres (83)

"Mediterranea Esperanto-Semajno"

en France

mars 2-9 - Verniolle (09) : 26ème stage de chant choral - infos : tutpeko@aliceadsl.fr

avril 20-23 - Montluçon (03) : Congrès de Sat-Amikaro
infos : daniel.lachassagne@orange.fr

avril 26/mai 4 - Baugé (49) - Château de Grésillon : 9ème "Printemps" - infos : kastelo@gresillon.org

avril 12-16 - Douvres (Grande-Bretagne)

Congrès commun d'Espéranto-France et de l'Association britannique d'espéranto

infos : esperanto-france.org/kongreso.2019

mai 1-5 - Malaga (Espagne) : 78ème Congrès espagnol d'espéranto - infos : www.esperanto.es

mai 3-10 - Malaga (Espagne) : 71ème Congrès des cheminots - infos : esperanto-andalucia.info/

juillet 20-27 - Lahti (Finlande) : 104ème Congrès international d'UEA

infos : kongresoj@co.uea.org